WIKIPEDIA

Hispana lingvo

La **hispana lingvo** aŭ **kastilia lingvo** (hispane: *Español*, *Castellano*) estas latinida lingvo origininta en la hispana historia regiono de Kastilio, kaj nuntempe parolata ĉefe en Hispan-Ameriko kaj Hispanio.

La hispana lingvo estas oficiala en Hispanio, Hispanameriko (Argentino, Bolivio, Ĉilio, Domingo, Ekvadoro, Salvadoro, Gvatemalo, Honduro, Kolombio, Kostariko, Kubo, Meksiko, Nikaragvo, Panamo, Paragvajo, Peruo, Puerto-Riko, Urugvajo kaj Venezuelo) kaj Ekvatora Gvineo. Krome, ĝi estas ankaŭ ofte parolata en Okcidenta Saharo, norda Maroko, Andoro, Ĝibraltaro, Trinidado kaj Tobago, Kanado, Germanio, Francio kaj Svislando. Laŭ la oficiala usona censo de 2000, 28,1 milionoj da usonanoj parolis la hispanan hejme. En la urbo de Hialeah (Florido), ekz., 92 procentoj de la loĝantaro parolas la hispanan hejme. La hispana estis iam vaste parolata en Filipinoj, sed nun de nur 0,01% de la loĝantaro. La hispana estas unu el la ses oficialaj lingvoj de UNO (kun la ĉina, angla, rusa, araba kaj la franca), kaj ankaŭ oficiala lingvo de la Eŭropa Unio kaj la Afrika Unio. Ĝi estas unu el la fontoj de Interlingvao. Ĝi tamen apenaŭ influis Esperanton rekte. Laŭ nombro de denaskaj parolantoj, ĝi estas la plej vaste parolata latinida lingvo, sed laŭ internacieco kaj nombro de dualingvanoj, la franca pli furoras: la franca estas regata kaj studata tra la mondo, sed la hispana, ekster Ameriko, malpli ofte.

La hispana plej similas al la portugala kaj la kataluna: dum la portugala estas la latinida lingvo de okcidenta Iberio, kaj la kataluna tiu de orienta Iberio, la hispana estas tiu de la mezo, precipe de Madrido.

Akademio nomata *Real Academia Española* (Reĝa Akademio Hispana) registras kaj gvidetas la evoluon de la lingvo, celante la interkomprenon de hispanparolantoj tutmonde.

Papiamento kaj la ĉabakana estas kreolaj lingvoj kun hispana influo.

En la kanaria insulo *La Gomera*, oni konservas fajfan variaĵon de la loka hispana, nomatan *silbo*.

Hispana, Kastilia

Español, Castellano

Parolata en	(vidu sube)
Parolantoj	437 000 000
Denaskaj parolantoj	proksimume 400 milionoj
Fremdlingvo / dua lingvo por	inter 60 kaj 100 milionoj
Skribo	latina kun kelkaj aldonoj

Lingvistika klasifiko

Hindeŭropa lingvaro

Italika

Latinida

Ibero-latinida

Oficiala statuso

Oficiala lingvo en	Argentino Bolivio Ĉilio Kolombio Kostariko Kubo Ekvadoro Salvadoro Hispanio Gvatemalo Ekvatora Gvineo Honduro Meksiko Nikaragvo Panamo Paragvajo Peruo Okcidenta Saharo Domingo Urugvajo Venezuelo
Reguligita de	Asocio de akademioj de hispana lingvoj (Real Academia Española kaj 21 aliaj)
Lingva statuso	1 sekura

Lingvaj kodoj

Lingvaj kodoj	
ISO 639-1	es

Enhavo

Historio

Ortografio
- Alfabeto
  - Digrafoj
  - Kornoj kaj aliaj supersignoj
- Specialaj simboloj
- Kelkaj ortografiaj reguloj

Prononco
- Vokaloj
- Diftongoj
- Konsonantoj
  - c
  - g
  - h
  - j
  - ñ
  - q
  - r
  - s
  - v
  - w
  - x
  - y
  - z
- Prononco de digrafoj
  - ch
  - ll
  - qu
  - rr
- Akcento
  - Silab-nombrado
  - Akcento en senkornaj vortoj
  - Akcento en kornaj vortoj

Geografia distribuo
- Instituto Cervantes

Dialektoj

Hispana lingvo kaj Esperanto
- Hispandevenaj Esperantaj vortoj
- Identaj vortoj (laŭ litero)
- Falsaj amikoj
- Tre similaj vortoj

ISO 639-2	spa
ISO 639-3	spa
SIL	SPN
Glottolog	stan1288
Angla nomo	Spanish
Franca nomo	espagnol

Specimeno

Deklaracio de Homaj Rajtoj, art. 1: Todos los seres humanos nacen libres e iguales en dignidad y derechos y, dotados como están de razón y conciencia, deben comportarse fraternalmente los unos con los otros.

Vikipedio

Vidu ankaŭ
Referencoj
Eksteraj ligiloj
Literaturo

Historio

Mapo pri la lingvoj parolataj sur la Ibera duoninsulo: la hispana bildigita helverda [1]

Oni nomas la komencan fazon de la hispana "kastilia lingvo", kiu devenas de la latina vulgara de la jaroj 500–1000, t.e. la jarcentoj post la disfalo de la Okcidenta Romia Imperio, kiam la latina de la nuna Iberio fariĝis izolita de Francio kaj Italio. La origina lando de la hispana lingvo (norda Kastilio kaj Rioĥo) havis subtavolon eŭskan. Tial kelkaj studantoj resumas, ke la hispana lingvo estas la vulgara latina tia, kiel ĝin parolis eŭskoj. La unuaj skribaj atestoj de la kastilia estas glosoj en latinaj religiaj tekstoj manskribitaj ĉe monaĥejo en *San Millán de la Cogolla* en la 10-a jarcento. La potenco de Kastilio, kiu post *Reconquista* restis la plej granda regno en Iberio, kaŭzis, ke ties lingvo estis favorata de kleraj hispanoj, anstataŭ la galega, la kataluna, la eŭska kaj aliaj iberiaj lingvoj.

En la Mezepoko la kastilia ricevis grandan vortoprovizon el la prestiĝa araba lingvo, ĉu rekte ĉu per la mozarabaj latinidoj, ĉefe pri terkulturo, juro kaj milito. Ankaŭ francaj vortoj pri feŭdismo estis ricevitaj. Maturiĝo venis ankaŭ per la laboro de la Akademio de Tradukistoj, kiun Alfonso la 10-a de Kastilio fondis en Toledo.

En 1492 la Katolikaj Gereĝoj komisiis Antonion de Nebrija verki la unuan gramatikon, por fiksi la uzon, kaj por instrui la novajn subulojn de la hispaniaj gereĝoj.

Ankaŭ en 1492, hispanaj judoj (sefardoj) estis trudpelitaj el Hispanio. Tiu komunumo portis la lingvon de la 15-a jarcento, kaj evoluigis ĝin en siaj rifuĝaj landoj. Eĉ hodiaŭ la judhispana lingvo estas konservata en Israelo, Balkanio, Turkio kaj norda Afriko.

Inter la 16-a jarcento kaj la 18-a jarcento, per la kresko de la hispana imperio, la hispana estis disvastigita al Ameriko. La hispana de Ameriko devenas plejparte de suda Hispanio, ne de la madrida variaĵo, tial ili evoluis malsame (precipe en prononco), sed malgraŭ tio, la klera lingvo estas rekoneble la sama de Tierra del Fuego ĝis Madrido.

Dum Renesanco, la hispanaj artistoj, diplomatoj kaj militistoj riĉigis la lingvon per vortoj italaj, francaj kaj klasiklatinaj. La koloniistoj en Ameriko devis adapti aŭ preni vortojn por nomi amerikaĵojn.

La baza vortoprovizo devenas de la latina vulgara, sed ĝi estas modifita de jarcentoj da sonŝanĝoj.

Ortografio

Alfabeto

Ĝi estas latin-devena kaj konsistas el 27 literoj, 26 komunaj al angla-askia alfabeto plus la supersignita litero *ñ* (majuskle, *Ñ*), kaj 3 digrafoj: *ch*, *ll* kaj "rr" .

- a, b, c, ch, d, e, f, g, h, i, j, k, l, ll, m, n, ñ, o, p, q, r, s, t, u, v, w, x, y, z.

Nomoj de la literoj/digrafoj, laŭ hispana lingvo: *a, be, ce, che, de, e, efe, ge, hache, i, jota, ka, ele, elle (ele doble), eme, ene, eñe, o, pe, ku, erre, ese, te, u, uve (be baja), uve doble, equis, i griega (ye), zeta*.

Digrafoj

Ekde 1803 la digrafoj *ch*, *ll*, estis konsideratаj apartaj literoj. Ekde 1994 digrafoj estas konsideratаj, nur el liter-ordiga vidpunkto, kiel simplaj duliteraj kombinoj.[2] Tamen, ili konservas la sian kategorion kiel simboloj de la alfabeto.

Do, la vortoj "cabeza", "chamán", "curva", "lava", "lluvia", "luna" ordiĝus jene:

- *cabeza*, *curva*, *chamán*, *lava*, *luna*, *lluvia* (malnova sistemo)
- *cabeza*, *chamán*, *curva*, *lava*, *lluvia*, *luna* (aktuala sistemo)

Ankaŭ la vortaroj spegulas tiun fakton, tiel ke malnovaj vortaroj havas apartajn ĉapitrojn por *ch* kaj *ll*, sed tiuj vortaroj eldonitaj ekde 1994 ne plu havas tiujn ĉapitrojn. La ŝanĝon faciligis la fakto, ke en la hispana ne ekzistas vortoj, en kiuj la kombinojn *c-h* aŭ *l-l* oni prononcas aparte, male al la kataluna lingvo, kiu skribe kaj prononce distingas inter *ll* kaj *l·l*.

La kombino *qu* estas konsiderebla digrafo, ĉar *q* neniam aperas antaŭ alia litero ol *u*; sed en vortaroj la koncerna sekcio estas titolata nur per *q*.

Kornoj kaj aliaj supersignoj

Vokaloj povas esti supersignitaj per dekstra korno: *á, Á, é, É, í, Í ó, Ó, ú, Ú*; kaj krome litero *u* per tremao: *ü, Ü*.

Kornoj havas implicon nur en la akcento ene de la vorto (vd. korespondan sekcion) kaj kiel leksika identigilo; sed ili ne ŝanĝas la prononcon de la vokaloj. Tremao signas unu specialan ortografian okazon. Do, supersignitaj vokaloj ne apartenas al alfabeto kiel apartaj simboloj.

Specialaj simboloj

En la hispana lingvo, la komenco de kri-frazoj kaj demando-frazoj estas signita per respektive speciala simbolo, kiu reprezentas 180-gradan rotacion de la normala ferma simbolo:

- Kri-aperta simbolo: **¡**, (U+161), *¡pero qué has hecho!*
- Demand-aperta simbolo: **¿**, (U+191), *¿Dónde he dejado las llaves?*

Kelkaj ortografiaj reguloj

- *q* nur konsistigas la digrafon *qu*, en la kombinoj *que*, *qui*. Ekz.: "re**que**són", "ar**qui**tectura". Ĝi neniam aperas senpere, krom en fremdaj nomoj.
- En normala teksto, kie normalaj reguloj de interpunkcio aplikeblas, se majuskligota simbolo estas digrafo, oni majuskligu **nur** la unuan literon de la digrafo. Ekz.: *Chimenea*, *Llama*, *Quemadura*.
- *z* aperas antaŭ la vokaloj *a, o, u* kaj antaŭ konsonantoj. Do, la grupoj *ze*, *zi* estas ege esceptaj (kurioze, la propra nomo de la litero estas unu tia escepto); ofte esceptoj venas el vortoj

pruntitaj el aliaj lingvoj.

- *n* povas aperi antaŭ kiu ajn konsonanto krom *p* kaj *b*, kie nepre estu *m*. Ekz. "e**m**pezar". Tio implicas, ke en kunmetitaj vortoj, *n* ŝanĝiĝas al *m* se ĝia loko estas antaŭ *p, b*. Ekzemple "tente**m**pié" (el "tente e**n** pié").
- En kunmetitaj vortoj, simpla *r* duobliĝas se ĝi falas inter du vokaloj. Ekz.: "costa**rr**icense" (el "Costa **R**ica").
- Tremaa *u* (*ü*) aperas nur en la grupoj *güe*, *güi* por signi ke *u* efektive prononciĝas (vd. korespondan sekcion). Ekz.: "cig**ü**eña".
- Korno super vokalo de unusilaba vorto montras alian signifon al senkorna vorto. Ekzemploj:
  - *te* (vin) - *té* (teo)
  - *mas* (sed) - *más* (pli, plu, plus)

Prononco

La hispana lingvo estas fonetika lingvo, en la senco ke ĝia prononco povas esti instruata kiel prononco de individuaj literoj, kun ties esceptoj, algluitaj en vortoj.

La fonemoj de la hispana lingvo povas esti sufiĉe bone reprezentataj per esperantaj fonemoj, krom du-tri esceptoj. Tial, en la jena priskribo estas evitataj oftaj aludoj al Internacia Fonetika Alfabeto.

Vokaloj

Vokalaj sonoj estas reprezentataj per literoj: *a, e, i, o, u*, kiuj havas saman norman prononcon al esperantaj vokaloj, krom la okazoj kiam *i, u* diftongiĝas.

Krome, izolita aŭ interkonsonanta litero *y* prononciĝas kiel esperanta *i*.

Ekzistas nenormaj variantoj en regionoj kie la hispana kunvivas kun aliaj lingvoj kun pli komplikaj vokalaj sistemoj (ekz., la kataluna).

Diftongoj

La neakcentitaj vokaloj *i, u* apud aliaj vokaloj preskaŭ ĉiam diftongiĝas al respektive esperantaj *j, ŭ*. Ekzemploj:

- *peine* [pej-ne]
- *neumático* [neŭ-ma'-ti-ko]
- *Diego* [dje-go]
- *muesca* [mŭes-ka]

En la kombinoj *vokalo-y-konsonanto* (malofta) kaj *vokalo-y-vortofino*, la litero *y* sonas kiel esperanta *j*. Ekz.: *hoy* [oj].

Konsonantoj

Jenaj konsonantoj samsonas, en ajna okazo, al koresponda esperanta konsonanto:

- b, d, f, k, l, m, n, p, s, t

Tamen, konsideru ke la ploziveco de *b, d, p, t* estas pli milda en la hispana ol en Esperanto.

c

- Antaŭ *a, o, u* kaj antaŭ aliaj konsonantoj ĝi egalas al esperanta *k*. Ekz. *casa* [ka-sa], *actitud* [ak-ti-tud']. En Galegio, pro influo de la galega lingvo, *c* antaŭ konsonanto ne prononciĝas.
- Antaŭ *e, i* ĝi samsonas al hispana *z* (vd. sube).

g

- Antaŭ *a, o, u* kaj antaŭ aliaj konsonantoj ĝi egalas al esperanta *g*. Ekz.: *gato* [ga-to], *estigma* [es-tig-ma].
- Antaŭ *e, i* ĝi samsonas al esperanta *ĥ*.
- Por atingi *g*-sonon antaŭ *e, i*, oni intermetas literon *u*. Ekz.: *guepardo* [ge-par-do], *guinda* [gin-da].
- Por sonigi la literon *u* en la kombinoj *gue*, *gui*, oni tremaas la literon *u*. Ekz.: *antigüedad* [an-ti-gŭe-dad'].

h

- Ĝi estas muta, do, ne prononciĝas (krom en la digrafo *ch*). Ekz.: *hora* [o-ra]. Ĝi postrestas pro etimaj kialoj.
- Ĝi principe malpermesas sinalefojn ene de vorto. Ekzemploj:
  - *albahaca* [al-ba-a-ka] (prefere ne [al-ba-ka])
  - *alcohol* [al-ko-ol'] (prefere ne [al-kol'])

j

- Laŭnorme, ĝi samegalas al esperanta *ĥ*. Ekz.: *jabato* [ĥa-ba-to].
- En suda Hispanio, Kanariaj Insuloj kaj Sudameriko, oni ofte aŭdas pli mildan sonon, similan al esperanta *h*. Ekz.: *jabato* [ha-ba-to].
- Tia estas ankaŭ la prononco de *g* en la kombinoj *ge*, *gi*. Ekz.: *germen* [ĥer-men] aŭ [her-men].

ñ

- Sono simila al *n*, sed kun emfaza palata nazaleco. Alilingvaj ekvivalentoj:
  - itale, gn
  - katalune kaj hungare, ny
  - pole, ni, ń
  - portugale, nh
- Ĝi povas esti reprezentata de la esperanta kombino *nj*. Ekz.: *España* [es-pa-nja].

q

- Nepre en digrafa kombino *qu*, ĝi samsonas al *k*. Ekz.: *queso* [ke-so].

r

Ĉiam trema, sed kun nuanca forto en la tremeco, laŭ jenaj konsideroj.

- Inter vokaloj, ĝi prononciĝas milde, unu-treme, kiel itala *r*. IFA-simbolo: ɾ. Ekz.: *pero* [pe-ɾo].
- Komence de vorto, antaŭ aŭ post konsonanto, kaj fine de vorto, ĝi prononciĝas forte, plur-treme, (samkiel prononcas *r*-on JoMo). IFA-simbolo: r. Ekzemploj:
  - *recuerdo* [re-kŭer-do].
  - *amor* [a-mor']
  - *trampa* [tram-pa]
- En Kubo, eblas foje aŭdi *l*-sonon surogate al trema sono. Ekz: *recuerdo* [le-kŭel-do].
- En Kostariko oni prononcas ĝin, ĉefe komence de vorto, kiel *ŭ*. Ekz.: *recuerdo* [ŭe-kŭe-ŭdo].
- Homoj kun langa handikapo, tia ke ili ne kapablas tremigi, surogatigas tremadon per unu el tiuj sonoj: *l*, *d*, kartava (http://www.reta-vortaro.de/revo/art/kartav.html#kartav.0i) (franca) *r*, *ŭ*.

Komparu la prononcon de rr.

En transkribo de hispanaj vortoj al Esperanto, oni ofte preteratentas la nuancon pri trem-forteco, ĉar kiaspeca tremado validas por esperanta *r*[3]. Do, hispana litero *r* kutime konserviĝas en Esperantaj transkriboj tiel, sen nuancigo.

s

- En kelkaj regionoj de Sudameriko kaj de Hispanio (Manĉo estas bona ekzemplo), *s* antaŭ *k*-sono prononciĝas kiel *ĥ* aŭ *h*. Ekz.: *pescado* [peĥ-ka-do] aŭ [peh-ka-do].
- Pro influo de apudaj voĉaj fonemoj, ĝia sono povas fariĝi ankaŭ voĉa, do *z*. Ekz.: *rasgo* [raz-go].

v

- Samkiel hispana *b*. Ekz.: *vivo* [bi-bo].
- La pra-prononco de tiu litero estis egala al esperanta *v*, do frikativa. En regionoj kie la hispana kunvivas kun lingvoj posedantaj ankoraŭ tiun fonemon (ekz. variantoj de la kataluna), eblas aŭdi tian prononcon. Tamen, tia prononco en nur-hispana parolanto estas ofte rigardata kiel afekta. Ekz.: *vivo* [vi-vo].

w

Malmultaj origine hispanaj vortoj havas tiun literon. Ĝi estas uzata ĉefe por alilingvaj vortoj.

- Preskaŭ ĉiam, ĝi prononciĝas anglece kiel *ŭ*, kun milda *g*-sono antaŭe. Ekz.: *wolframio* [(g)ŭol-fra-mjo].
- En multaj okazoj estas tolerata *b*-sono. Ekz.: *wolframio* [bol-fra-mjo].
- En ĝerman-devenaj vortoj ĝi prononciĝas kiel *b*: Ekz.: *Wamba* [bam-ba].

x

- Normale ĝi prononciĝas kiel la kombino *ks*. Ekz.: *explosión* [eks-plo-sjon'].

- En navatla-devenaj vortoj, kiel esperanta *ĥ*. Ekz.: *México* [me'-ĥi-ko]. La komento pri laŭregiona mildeco de prononco de *j*, aplikeblas ankaŭ en tiu ĉi okazo.
- En malnovaj skribaĵoj eblas trovi vortojn kun *x*, kiuj nuntempe skribiĝas per *j*. Do, en tia okazo, la prononco estas ankaŭ kiel *ĥ*. Ekz.: *Don Quixote* (nuntempe *Don Quijote*) [don ki-ĥo-te].

y

- En ceteraj okazoj, kiam ĝi ne agas kiel vokalo aŭ parto de diftongo (vd. supre), ĝia prononco estas simila al esperanta *ĝ*. Ekz.: *ayuda* [a-ĝu-da].
- En kelkaj regionoj de Argentino kaj Urugvajo, oni prononcas ĝin multe pli frikative, kun sono pli simila al esperanta *ĵ*. Ekz.: *ayuda* [a-ĵu-da].
- Foje oni aŭdas malpalatigitan sonon, tiel ke ĝi iĝas efektive kiel esperanta *j*. Ekz: *ayuda* [a-ju-da].

z

- En Kastilio kaj norda Hispanio, ĝia prononco egalas al angla digrafo *th* en la vorto *thing*. IFA-simbolo: θ. Ekz.: *zapato* [θa-pa-to].
- En cetera Hispanlingvujo, ĝia prononco egalas al esperanta *s*. Ekz.: *zapato* [sa-pa-to].
- Tia estas ankaŭ la prononco de *c* en la kombinoj *ce*, *ci*. Ekz.: *cecina* [θe-θi-na], aŭ [se-si-na].

Prononco de digrafoj

ch

- Samsona al esperanta *ĉ*. Ekz.: *muchacho* [mu-ĉa-ĉo].
- En Andaluzio kaj kelkaj sudamerikaj regionoj, eblas aŭdi sonon pli proksiman al *ŝ*. Ekz.: *muchacho* [mu-ŝa-ŝo].

ll

- Laŭnorme, ĝia sono egalas al tiu de konsonanta *y*, do, proksima al esperanta j. Ekz.: *ardilla* [ar-di-ja].
- En norda Kastilio kaj en Eŭskio eblas aŭdi originalan pra-prononcon, proksiman al kombino *gl* en la itala vorto *gli*. Ĝi povas esti proksimume reprezentata de esperanta kombino *lj*. Ekz.: *ardilla* [ar-di-lja].
- En kelkaj regionoj de Argentino kaj Urugvajo, oni prononcas ĝin multe pli frikative, kun sono pli simila al esperanta *ĵ*. Ekz.: *ardilla* [ar-di-ĵa].

qu

- Kiel *k*. Vidu artikolon pri *q*.

rr

- Ĉiam aperas inter du vokaloj, kaj reprezentas sonon egalan al forta *r*, pridiskutitan en la artikolo pri *r*. Ekz.: *perro* [pe-ro]. Konsideru ke la diferenco inter *pero* (sed) kaj *perro* (hundo), falas sur tiu malsama trem-forteco inter ambaŭ *r*-sonoj.

- La ceteraj konsideroj pri *r*-sonoj en la koncerna artikolo aplikeblas ankaŭ al tiu ĉi.

Akcento

En la akcento de hispanaj plursilabaj vortoj, nepras la rolo de la korno. La hispanaj vortoj povas prezentiĝi:

- aŭ sen korno,
- aŭ kun **unu** (nepre nur unu) korno super unu el la vokaloj de la vorto.

Silab-nombrado

Kiel en Esperanto, ĉiu vokalo signas la kernon de unu aparta silabo. Krom se enestas neakcentitaj malfortaj vokaloj *i, u* apud aliaj vokaloj; tiam, la koresponda malforta vokalo, per diftongiĝo, algluiĝas al la silabo de la najbara vokalo. Ekzemplo:

- "per**i**odista" [pe-rjo-dis-ta]; el 5 originalaj vokaloj, 2 kuniĝas en diftongo, el kio rezultas entuto da 4 silaboj.

Akcento en senkornaj vortoj

- Se la vorto finiĝas per vokalo, aŭ literoj *n* kaj *s*, la akcento falas sur la **antaŭlastan** silabon. Ekzemploj:
  - *mirada* (3 vokaloj = 3 silaboj) [mi-**ra**-da]
  - *paisanos* (1 diftongo + 2 ceteraj vokaloj = 3 silaboj) [paj-**sa**-nos]
  - *simplifiquen* (4 vokaloj = 4 silaboj) [sim-pli-**fi**-ken].
- En la ceteraj okazoj, la akcento falas sur la **lastan** silabon. Ekzemploj:
  - *preguntar* (3 vokaloj = 3 silaboj) [pre-gun-**tar**]
  - *parietal* (1 diftongo + 2 cetera vokalo = 3 silaboj) [pa-rje-**tal**]
  - *baobab* (3 vokaloj = 3 silaboj) [ba-o-**bab**]

Akcento en kornaj vortoj

- La akcento falas sur la silabon signitan de la korno. Ekzemploj:
  - *café* (2 vokaloj = 2 silaboj) [ka-**fe**]
  - *álbum* (2 vokaloj = 2 silaboj) [**al**-bum]
  - *estrépito* (4 vokaloj = 4 silaboj) [es-**tre**-pi-to]
- Se la korno falas sur malfortan vokalon (*i, u*) de ebla diftongo, la diftongo rompiĝas kaj la silabo enhavanta la malfortan vokalon portas la akcenton. Ekzemploj
  - *había* (1 rompita diftongo + 1 cetera vokalo = 3 silaboj) [a-**bi**-a]
  - *falúa* (1 rompita diftongo + 1 cetera vokalo = 3 silaboj) [fa-**lu**-a]
  - *país* (1 rompita diftongo = 2 silaboj) [pa-**is**].
    - Notu, ke la senkorna alternativo estas unusilaba, pro efektiviĝo de la diftongo: *pais* [pajs] (tamen tiu vorto ne vere ekzistas).

- Unusilabaj vortoj kun korno (kiu ne rompas diftongon) **nek** prononciĝas kun aparta emfazo, **nek** ŝanĝiĝas iel ajn ĝia prononco. En tiaj okazoj, korno signas alian signifon (vd. sekcion pri ortografio).
- Plursilabaj vortoj kun superflua korno, **nek** prononciĝas kun aparta emfazo, **nek** ŝanĝiĝas iel ajn ĝia prononco. En tiaj okazoj, korno montras alian gramatikan rolon de la vorto. Ekzemplo:
  - *esta* kaj *ésta* prononciĝas same: [**es**-ta]; do, ŝajne la korno de la dua vorto superfluas; tamen ĝi montras ke la dua vorto rolas kiel pronomo (la unua estas demonstrativa adjektivo).

Geografia distribuo

Instituto Cervantes

Instituto Cervantes estas komisiita de hispana registaro instrui la lingvon tutmonde. La raporto "El español, una lengua viva" - la hispana lingvo, vivanta lingvo (2015) de la Instituto Cervantes estimas ke estas 559 milionoj da hispanparolantoj tutmonde. Inter la fontoj cititaj en la raporto estas la Usona Censa Oficejo, kiu taksas, ke Usono havos 138 milionojn da hispanparolantoj antaŭ 2050, farante ĝin la plej granda hispanlingva nacio surtere, kun la hispana kiel gepatra lingvo de preskaŭ triono de ĝiaj civitanoj[4].



Oficiala lingvo
Grava neoficiala lingvo
Oficiala apud alia(j) lingvo(j)

Landoj kun signifa hispanparolantaro

Rango	lando	Nombro de la parolantoj
1	Meksiko	106 255 000
2	Usono	50 000 000
3	Kolombio	45 600 000
4	Hispanio	44 400 000
5	Argentino	41 248 000
6	Peruo	26 152 265
7	Venezuelo	26 021 000
8	Brazilo	19 700 000
9	Ĉilio	15 795 000
10	Kubo	11 285 000
11	Ekvadoro	10 946 000
12	Domingo	8 850 000
13	Gvatemalo	8 163 000
14	Honduro	7 267 000
15	Bolivio	7 010 000
16	Salvadoro	6 859 000
17	Nikaragvo	5 503 000
18	Paragvajo	4 737 000
19	Kostariko	4 220 000
20	Porto-Riko	4 017 000
21	Urugvajo	3 442 000
22	Panamo	3 108 000
23	Filipinoj	2 900 000
24	Francio	2 100 000
25	Portugalio	1 750 000
26	Haitio	1 650 000
27	Rusio	1 200 000
28	Maroko	960 706
29	Unuiĝinta Reĝlando	900 000
30	Japanio	500 000
31	Italio	455 000
32	Ekvatora Gvineo	447 000
33	Germanio	410 000
34	Okcidenta Saharo	341 000
35	Kanado	272 000
36	Ĉinio	250 000
37	Gujano	198 000
38	Svislando	172 000
39	Israelo	160 000
40	Aŭstralio	150 000
41	Belizo	130 000
42	Kuracao	112 450
43	Arubo	105 000
44	Sud-Koreio	90 000
45	Andoro	40 000

Dialektoj de la hispana parolataj en Argentino laŭ Berta Elena Vidal de Battini.[5]

46	Svedio	39 700
47	Trinidado kaj Tobago	32 200
48	Turkio	29 500
49	Nov-Zelando	26 100
50	Nederlando	17 600
51	Finnlando	17 200
52	Franca Gviano	13 000
53	Rumanio	7 000
54	Bonero	5 700
55	Usonaj Virgulinsuloj	3 980
56	Libano	2 300
57	Aŭstrio	1 970
58	Kuvajto	1 700

Dialektoj

Estas diversaj kriterioj por diferencigi la dialektojn de la hispana. Unuavice oni povas paroli pri la interferoj kiuj okazas en la areoj de la norda Hispanio kie oni parolas ankaŭ aliajn ligvojn kiaj la galega, eŭska, kataluna kaj aliaj; tio okazas ankaŭ en areoj kie jam oni ne parolas tiajn lingvojn, sed iam oni parolis ilin aŭ la influo venis al apartaj regionoj: temas ĉefe pri distingoj rilate al fonetiko kaj modulado. Duavice en Hispanio estas klaraj dialektoj en la suda Hispanio, nome la andaluza kaj la kanaria (ĉefe kun fonetikaj apartaj trajtoj), dum oni parolas pri transiraj parolmanieroj en Ekstremaduro kaj Murcio. Trialoke en Asturio kaj Aragono oni parolas reston de iamaj lingvoj leona kaj aragona respektive; kelkaj pridubas ĉu tiuj parolmanieroj estas dialektoj aŭ ankoraŭ veraj lingvoj apartaj. Kvaraloke la situacio en Ameriko estas multe pli komplika kaj plej ofte oni konsideras almenaŭ kvar zonojn:

- Meksiko kaj Usono
- Centrameriko kun Karibio
- Andoj (Anda hispana lingvo)
- Suda Konuso (Rioplata hispana)

Hispana lingvo kaj Esperanto

Kvankam Esperanto malofte prunteprenas vorton el la hispana, multe da vortoj en ambaŭ lingvoj estas sam-etimaj, tial ili similas :

Hispandevenaj Esperantaj vortoj

bojno (siavice de la Eŭska lingvo), *ĉaĉaĉao*, *Don Juano* (de Don Juan), *Don Kiĥoto* (de Don Quijote), *gerilo* (siavice de gota lingvo), *mestizo*, *pinjato*, *salso*, *tango*, *tekilo*, *toreadoro*, *zambo* (Amerik-hispana), *zarzuelo* (siavice de la Eŭska lingvo).

Identaj vortoj (laŭ litero)

al, *de*, *gusto*, *la*, *lago*, *libro*, *lino*, *mano*, *mil*, *minuto*, *oro*, *piano*, *piloto*, *pino*, *polvo*, *sola*, *teatro*, *tubo*, *veneno*, *vino*, ktp.

Falsaj amikoj

amor (amo), *bata* (robo), *bulo* (tromp(ig)a klaĉo), *bola* (pilko), *falo* (peniso), *frakaso* nur prononce (malsukceso), *kara* nur prononce (multekosta ina), *loka* nur prononce (freneza ina), *pene* (peniso), *rabo* (vosto, kaco), *robo* (rabo), *rostro* (vizaĝo), *trompa* (korno, rostro), *trompo* (turbo), *vena* (vejno).

Jen pli detala listo de falsaj amikoj.

Tre similaj vortoj

alto (alta), *amar* (ami), *barba* (barbo), *blanco* (blanka), *campo* (kampo), *cantar* (kanti), *claro* (klara), *color* (koloro), *comenzar* (komenci), *dolor* (doloro), *dormir* (dormi), *droga* (drogo), *estar* (esti), *fábrica* (fabriko), *flor* (floro), *grande* (granda), *ir* (iri), *lana* (lano), *león* (leono), *luna* (luno), *mar* (maro), *miel* (mielo), *pan* (pano), *pensar* (pensi), *pluma* (plumo), *picar* (piki),

que (ke), *rana* (rano), *sal* (salo), *seco* (seka), *seis* (ses), *taza* (taso), *té* (teo), *tener* (teni), *venir* (veni), *vender* (vendi), *verde* (verda), *vivir* (vivi), ktp.

La malsamoj inter esperantaj kaj hispanaj parencaĵoj plejparte sekvas la sonŝanĝon inter la latina, kies vortoj estas preferataj de Esperanto, kaj la hispana.

La latina ne havas la sonojn [ĵ], [h], kaj [ŝ], kiuj plejparte eniris en Esperanton tra la franca (kaj la angla). Tial la malsamo inter vorto hispana kaj Esperanta, ofte spegulas la malsamon inter la hispana kaj la franca – ekzemple,

boca [boka] (buŝo), *caballo* [kabaljo] (ĉevalo), *playa* [plaja] (plaĝo), ktp.

Vidu ankaŭ

- Hispanaj kaj hispanlingvaj personaj nomoj
- Hispanaj idiotismoj
- Lingvoj de Argentino
- Listo de misprononcadoj#Hispana
- Venezuel-hispana lingvo
- Ortografio de Bello

Referencoj

1. ↑ Castellano and the rest of Spanish Languages (http://images.google.es/imgres?imgurl=http://www.spanish-in-the-world.net/img/mapa_castellano.gif&imgrefurl=http://www.spanish-in-the-world.net/Spain/europe.php&h=294&w=519&sz=26&hl=es&start=4&um=1&usg=__UFcT4EXaIsd06aoxSh7wkZvackw=&tbnid=VOrhTA9_5ANf2M:&tbnh=74&tbnw=131&prev=/images%3Fq%3Dcastellano%26um%3D1%26hl%3Des%26lr%3Dlang_es%26sa%3DX)
2. ↑ 10a Kongreso de la *Asociación de Academias de la Lengua Española* (Madrido, 1994)
3. ↑ Bertin Wennergren (2011-06-02). PMEG (https://bertilow.com/pmeg/skribo_elparolo/elparolo/bazaj_reguloj.html) (esperante). Alirita 2013-03-16.
4. ↑ (angla) Stephen Burgen, *US now has more Spanish speakers than Spain – only Mexico has more (https://www.theguardian.com/us-news/2015/jun/29/us-second-biggest-spanish-speaking-country)* (Usono nun havas pli da hispanparolantoj ol Hispanio - nur Meksiko havas pli), US News, 29 June 2015.

5. ↑ Vidal de Battini, Berta (1964): *El español de la Argentina: estudio destinado a los maestros de las escuelas primarias*, maparo de María Teresa Grondona. Buenos Aires: Consejo Nacional de Educación.

Eksteraj ligiloj

- Hispana lingvo (http://www.dmoz.org/World/Esperanto/Informo/Vortaroj/Hispana/) ĉe la Projekto por Malferma Katalogo
- Retaj vortaroj Hispana-Esperanta (http://aulex.ohui.net/es-eo/?idioma=eo) kaj Esperanta-Hispana (http://aulex.ohui.net/eo-es/?idioma=eo)
- Maŝintraduko el Esperanto al la hispana (http://espadiamapas.webs.com/EOtranes.html)

Literaturo

- *Monato*, internacia magazino sendependa, numero 1993/05, paĝo 18: *La hispana* verkita de Bradley Kendall.

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Hispana_lingvo&oldid=6948164"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 16:12, 27 apr. 2020.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.